





tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

julio 2013 / n-ro 118



-  Kroatio – la 28a membroŝtato de Eŭropa Unio!
-  Rijeka invitas al Eŭropa Esperanto-Kongreso en 2014!
-  En Koreio aperis la korea „Hlapić“
-  Paŝoj por kandidatigo de Zagrebo por gastigo de Universala Kongreso de Esperanto

Sur la titolpaĝo vi trovas la pentraĵon de **Ferdinand Hodler**, granda svisa pentristo kaj patro de **Hector Hodler**, la fondinto de **Universala Esperanto-Asocio** el 1908. Ni publikigas ĝin ekskluzive, kiel rarajon. La pentraĵon cedis al ni ties posedanto **Umjetnička galerija/Artgalerio el Sarajevo**. La galerio distribuas tiun pentraĵon sur siaj bildkartoj. La galerio en 2013 estas fermita, la pentraĵo de **Ferdinand Hodler** estas gardata en kelo.

Kion kroataj esperantistoj faris en 2013?

Ni komencis la jaron per la bona signo, per la premio al **Zdravko Seleš** el Đurđevac atribuita en Rusio okaze de Zamenhof-tago 2012 de la eldonejo **Impeto**. **Seleš** ricevis la trian premion pri la konkurso pri recenzo de la verko de **Mikaelo Bronštejn**. Li verkis la recenzon pri la verko **Urbo Goblinsk por Renkontiĝo de verkistoj en Hraščina** okaze de la gastado de la verkisto **Bronštejn** en **Kroatio**. La titolo de la recenzo estis **La nova realismo de Mikaelo Bronštejn aŭ eta traktado pri leganto**.

La jaro 2013 estas en la kroata kulturo konsiderata kiel „la jaro de **Hlapić**“, ĉar tiu grava infanlibro de verkistino **Ivana Brlić-Mažuranić** aperis en 1913 kaj atingis centjariĝon en 2013.

Vesna Radošević, bibliotekistino en la zagreba biblioteko **Travno** organizis belan ekspozicion de pentraĵoj elektitaj el ĉ. 130 eldonoj de **Hlapić**. En la ekspozicio trovis lokon ankaŭ la pentraĵoj eldonitaj en **Azio** per Esperanto. **La kroata TV** elsendis programon pri la ekspozicio kaj apartan akcenton donis al la japana tradukisto **Sekoguchi Ken** kaj liaj genepoj kiuj inspiris la tradukadon. Sekve de la ekspozicio **Ivan Špoljarec** gvidas Esperanto-kurson por gelnantoj - biblioteksitoj en la biblioteko **Travno** kaj **Đivo Pulitika** por studentino en Studenta Esperanto-Klubo.

Instruista fakultato en Petrinja invitis la 29an de januaro 2013 **Spomenka Štimec** por prelegi pri **Hlapić** en **Azio** per la Esperanta traduko. La invitinto estis **d-ro Berislav Majhut**, fakulo pri la verkaro de **Ivana Brlić-Mažuranić** kaj kompilinto de ŝiaj kolektitaj verkoj. Per bildoj helpis pri la prelego **Nataša Dorosulić**, prezidantino de **Esperanto-Societo Sisak**.

Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj eldonis la sonan numeron de **Tempo**, el la decembra numero de **Tempo**.

Esperanto-Societo el Sisak invitis al diskutoj pri statutŝanĝoj kaj la 2an de februaro en **Sisak** renkontiĝis reprezentantoj el **Đurđevac**, **Bjelovar**, **Velika Gorica** kun la reprezentanto de **Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto** por viglaj diskutoj.

Komisiono pri statuto de Kroata Esperanto-Ligo (**Vjekoslav Morankić**, **Davor**

Klobučar kaj **Srećko Radulović**) kolektadis opiniojn pri statutŝanĝoj kaj transdonis ilin al Prezidantaro de KEL sen unueca opinio ene de la komisiono. Dum tiu laboro multaj kroataj esperantistoj estis elmetitaj al la lavango de disputaj diskutoj. Fine la Jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo per la asemblea decido ŝanĝis la Statuton, akceptante du novŝanĝitajn artikolojn.

Esperanto Societo Rijeka aktivigis siajn membrojn por partopreni, samkiel en la antaŭaj jaroj, en la populara karnavalo de **Rijeka** kiel **Esperanto-Kompanio Paždroč**. Esperantistoj paradis tra **Rijeka** la 10an de februaro 2013.

El Rijeka venis al ni bela informo: esperantistoj de **Rijeka** aktivas por gastigi en julio 2014 en sia urbo **Eŭropan Esperanto-Kongreson**. Kroataj esperantistoj estas invitatataj partopreni en tiu aranĝo por sperti iom da internacia etoso kaj plibonigi siajn lingvajn lerteojn.

Dum la tuta duonjaro 2013 **Esperanto-Societo „Tibor Sekelj“** kun prezidantino **Mea Bombardelli** okazigis prelegojn la unuan merkredon ĉiumonate. Pri la unua laborjaro raportas prezidantino de la societo **Mea Bombardelli**.

Al **Hirosima Esperanto-Centro KEL** sendis bondezirojn okaze de la 8a de marto 2013. La mesaĝoj de diversaj mondopartoj estis ekspoziciitaj en la urbodomo de **Hirosima** de la 8a ĝis la 22a de marto 2013.

Judita Rey Hudeček prelegis en urba biblioteko **Sisak** pri **Tibor Sekelj** la 13an de februaro 2013 kaj **Spomenka Štimec** pri „**Hlapić** en **Azio**“ samloke la 26-an de marto. Tiutage forpasis nia kara membro **D-ro Josip Vrančić**.

Josip Pleadin anoncis la aperon de nova libro de **Tibor Sekelj**, realigota per internacia tradukteamo.

Roža Brletić-Višnjić instruis komecantan kurson por la membroj de **Kroata Fervojista Esperanto-Asocio**. En junio 3 kursanoj ricevis diplomojn.

Esperanto-Societo Estonteco el Križevci omaĝis al la morto-tago de **Zamenhof** per programo pri holokaŭsto kiun prezentis gimnaziano **Filip Crikvenčić** el **Varaždin** kun **Spomenka Štimec** kunlabore kun la urba biblioteko de **Križevci**, la 11an de aprilo 2013.

Turisma Asocio de Hrvatska Kostajnica okazigis programon honore al sia samurbanano, esperantistino **Antonija Jožičić**, en la loka hotelo la 19an de aprilo 2013. Instruistino **Antonija Jožičić** esperantigis la verkon **Konfeso de verkistino Milka Pogačić** kaj publikigis ĝin en **Kostajnica 1913** en la loka presejo **Vugrin**. Per la esperanta traduko la verko aperis en **Ĉinio**, en **Ŝanhajo** en 1931. **Kroata TV** raportis pri la centa jubileo de la eldono en la elsendo de **Bonan matenon**,

Kroatio/Dobro jutro Hrvatska. La elsendon prizorgis ĵurnalistino **Larisa Ostojić**. Pri **Antonija Jožičić** teatris instruistinoj el **Hrvatska Kostajnica** **Ines Konjevod** kaj **Mirela Bartolić**. Pri **Antonija** parolis heredintino **Milkica Lukić**. Fragmenton de la ĉina traduko legis **Marin Mikulić**. Enkondukis la programon **Judita Rey Hudeček**.

Lige al la centa jubileo de **Hlapić**, **Centro por infana literaturo/Centar za dječju knjigu** okazigis en **Zagrebo** la 24an de aprilo prezenton de la ĉina **Hlapić**. Pri Esperanto parolis al la infana publiko **Judita Rey Hudeček**, el la ĉina **Hlapić** legis **Marin Mikulić**.

Ministerio pri kulturo reduktis niajn regulajn rimedojn al **20.000 kn**. **La Ministerio** aprobis por **Tempo** 5.000 kn. **Ministerio** aprobis subvencion al **Renkontiĝon de verkistoj** okazonta de **13-15a** de septembro en **Hraščina** de 10.000 kn. **Ministerio** aprobis por prezo de **Hlapić** dum la **Universala Esperanto-Kongreso** en **Rejkjaviko** subvencion por flugbileto. Helpis por la sama programo **Nacionalna zaklada za razvoj civilnog društva/Nacia fondaĵo por evoluo de la civila socio**.



Saluton el la Strato Marinko Givoje sur la insulo Korčula. Fotis Maja Kušan.

En la pasintaj monatoj pri inventario plurfoje kunsidis membroj de inventaria komisiono **D-ro Zlatko Hinšt**, **Bojana Đuričić**. Al la komisiono aliĝis en 2013 **Dalibor Šeatović**.

Plurajn kunsidojn havis Kontrolkomitato konsistanta el **Anto Mlinar**, **Roža Brletić-Višnjić** kaj **Stjepan Žarina**. La Prezidantaro havis tri kunsidojn, la 9an de februaro, la 13an de aprilo kaj la 18an de majo 2013.

Jerusalem gastigis la 7an Azian kongreson de Esperanto. Neniu esperantisto el **Kroatio** partoprenis.

La 19an de majo kataluna TV elsendis programon **La Universala Lingvoj**. La programon kreis nia membro **Kaja Farzsky** kun sia kataluna amiko **Carles**. En la elsendo **Kaja** kaj **Carles** kuiras, muzikas, parolas pri Esperanto, pri **Kroatio**. Ne mankis reklamo por la kroata spico **Vegeta**. Ni publikigas la

barcelonan foton pri **Kaja** kaj **Carles de Filip Farszky**.

Departamento Krapinsko-zagorska aprobis 3.000 kn por meteorita festo en **Hraščina** la 25-an de majo en kiu gastis la fakuloj por **Hlapić**, universitataj profesoroj d-roj **Vinko Brešić** kaj **Berislav Majhut**. Kroate legis fragmentojn el la libro aktorino **Barbara Rocco**, perse legis **Monem Farhud**, koree legis **Wi Son-Ok**, ĉine legis **Marin Mikulić**. Enkonduke parolis **Judita Rey Hudeček**. Kvindeko da personoj ĉeestis. Kunfinancis Komunumo **Hraščina**, kiu la programon pri meteorito de **Kroata Esperanto-Ligo** elektis ekde la jaro 2012 por sia tago de la komunumo.

La zagreba **biblioteko Staglišće** gastigis la programon pri **Hlapić** la 28an de majo 2013. Prelegis **Spomenka Štimec**. En Esperanto **Hlapić** prezentis **Nevenka Imbert**, en la ĉina **Marin Mikulić**.

La jarkunveno de **Kroata Esperanto-Ligo** okazis la 8-an de junio 2013 en nia estonta strato, en **Vodnikova 12, Centar za strane jezike/Centro por fremdaj lingvoj**. Interesitaj asembleanoj povis post la asembleo viziti niajn ejojn en **Vodnikova 9**.

Kiel progresas repagoj de kreditoj por **Vodnikova 9**, bonvolu vidi en la rubriko pri **Vodnikova** ĉi-numere.

Nian gazeton **Tempon** dum la unua jarduono helpis per financa kontribuo 51 membroj kiuj enpagis sume 3.235 kn.

Dum la unua parto de la jaro jarkuvenis **Esperanto-Societo Bjelovar**, **Esperanto-Societo Sisak**, **Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj** kaj **Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto**.

Jen somero antaŭ ni.

Pluraj membroj preparas sian vojaĝon al **Rejkjaviko**.

Esperanto-grupo kadre de **Asocio por la rusa lingvo kaj kulturo**, gvidata de **Mato Špekuljak** anoncis someran kurson de Esperanto en sia sidejo en **Amruševa 13**.

Esperanto-Societo Sisak invitas al **Boatado sur la rivero Kupa**.

Dokumenta Esperanto-Centro invitas al **Esperanto-Somerumado en Prvić**.

Septembra programo de niaj membroj estis jene anoncita:

Esperanto-Societo Trixini invitas al **Hraščina**, la 14an de septembro 2013 al **Renkontiĝo de verkistoj**, kun la gastino **Achtar Etemadi**, tradukistino de **Hlapić** el **Teherano**.

Josip Pleadin invitis al **Bjelovar** en septembro al la Esperanto-programo de la **Tagoj de la urbo Bjelovar**.

Vanja Radovanović kaj **Višnja Branković** invitas al **Montkabana Renkontiĝo** en **Slavonio**, sur monto **Papuk** 26-29a de septembro 2013.

La venonta **Tempo** aperos en aŭtuno dank' al la subvencio por **Tempo** al **Esperanto-Societo Trixini** en **Hraščina**.

Kiam vi havos tiun ĉi numeron de **Tempo** en viaj manoj, **Kroatio** estos la 28 ŝtato de Eŭropa Unio! Dankon al la geamikoj kiuj sendis al ni multajn bondezirojn. La nova paĝo en nia historio turniĝas.

Ankaŭ kiel eŭropanoj – ne forgesu ke Esperanto vivas de via energio!

Havu agrablan someron!

S. Štimec



Inter la 6-a kaj 11-a de julio 2014 okazos en **Rijeka** la 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio. Eŭropa Esperanto-Unio estas organizaĵo de Esperanto-asocioj en Eŭropa Unio kaj ekde tiu ĉi jaro Kroatio fariĝis ĝia regula membro. EEU havas siajn kongresojn ĉiun duan jaron kaj nun ĝi decidis okaze de eniro de Kroatio en EU-membrecon okazigi sian kongreson ĉe ni bonvenigante tiel nian landon en la familio de eŭropaj landoj.

Ni antaŭvidas ĉirkaŭ 300 partoprenantojn el trideko da eŭropaj landoj kaj gastojn ankaŭ el aliaj. La estraro de EEU difinis la kongresan temon: **Justa Eŭropo kun justaj lingvaj rilatoj, pli racia demokratia komunikado**.

La lokan organizon transprenis Organiza Komitato en kiu estas tri membroj de E-societo el Rijeka kaj du de EEU. Okazis jam pluraj lokaj kontaktoj. La kongreson oficiale invitis la urbestro de Rijeka, **Vojko Obersnel** kaj la urbestro certigis la kongresejon: **Kulturdomon de Rijeka**. Okazis ankaŭ interparolo kun la reprezentanto de la Regiono **Promorsko-Goranska** kiu estos unu el la sponsoroj. Estas ankaŭ rezervitaj pluraj hoteloj.

Detaloj por la aliĝo estos je dispono aŭtune kiam ekfunkcios aparta reta paĝaro de la kongreso.


Ni invitas ĉiujn esperantistojn de Kroatio pripensi sian partoprenon, ĉar eŭropaj kongresoj havas aparte interesajn prelegojn, forumojn, rondotablojn pri la planoj kaj strategioj de eŭropaj esperantistoj en Eŭropa Unio. Ankaŭ la kulturaj aranĝoj riĉos kaj same la ebloj ekskursi en la ĉirkaŭaĵo.

Tujan kontaktoj ĉe: eeu@europa.eu

La paĝaro de EEU: www.europa.eu kie vi povas legi ankaŭ monatan revuon: **Eŭropa Bulteno**.

Zlatko Tišljar, sekreatrio de EEU


En aprilo 2013 en Rijeka estis malfermita la moskeo en la formo de konko, kiun konceptis granda kroata skulptisto Dušan Džamonja. Fotis Damir Morankić



Picasso kaj Caravaggio en Zagrebo

Por honori eniron de **Kroatio** al Eŭropa Unio la 1-an de julio 2013, **Zagrebo** gastigas du monde gravajn pentristojn. Klovićevi dvori gastigas de la 23a de marto ĝis la 7a de julio 2013 eĉ 56 pentraĵojn kaj skulptaĵojn de **Pablo Picasso** (Malaga, Hispanio 1881 - Mougins, Francio 1973). Li estas konsiderata la plej granda pentristo de la dudeka jarcento, fondinto de kubismo. Kiel skulptisto kaj grafikisto li signis la arton de la dudeka jarcento. Plurajn el liaj pentraĵoj inspiris la kroatdevena artistino **Dora Maar**, akompanintino de Picasso dum multaj jaroj. Ŝi estis naskita en Argentino, kien elmigris ŝia patro, kroata arkitekto.

Dora Maar posedis aron da verkoj de Picasso



kaj mem atestis kiel fotistino pri la kreado de liaj multaj verkoj, interalie la fama verko Guernica. (Estas kurioze, ke la heredintoj de Dora Maar vivas en Ivanićgrad.) La verkoj de la senrivala pentristo Picasso elmontrataj en Klovićevi dvori prezentas lian kompletan kreadon de la fruaj verkoj, esploron de Afriko, klasikan periodon, surrealismon kaj la lastajn pentraĵojn.

Vespermanĝo en Emaus, la verko de la plej fama geniulo de la baroka epoko en Italio, **Michelangelo Merisi da Caravaggio** gastas en la Zagreba Muzej za umjetnost i obrt / Muzeo por arto kaj metio. La gastado de la fama pentraĵo el la Pinacoteca de Brera el Milano estas la donaco de Itala Respubliko al Respubliko Kroatio okaze de la eniro en EU.

Tiel **Zagrebo** honore al la eniro de Respubliko Kroatio al al EU spertas artistan etoson de grandaj mondaj muzeoj kiaj estas pariza kaj milana.

S. Ŝ.

Novaj kotizoj por membroj de KEL

Membroj de Kroata Esperanto-Ligo (societoj kaj kluboj) dum jaroj pagadis 5 kn por ĉiu sia membro por la jara kotizo al KEL.

Dum sia kunsido la 9an de februaro 2013 la Prezidantaro de KEL akceptis decidon per kiu estas fiksitaj la nova kotizo: 16,00 kn jare por anoncita membro de la asocio. Tiu ĉi decido ekvalidas tuj post la akcepto.

Klarigo: Kroata Esperanto-Ligo estas membro de Universala Esperanto-Asocio kaj de Eŭropa Esperanto-Asocio. Kroata Esperanto-Asocio devas pagadi

jarkotizon al ambaŭ asocioj kaj tiuj estas la jenaj:

Al UEA 0,62 eŭroj x 7,55 kn = 4,68 kn por ĉiu membro.

Al EEU 0,50 eŭroj x 0,755 = 3,78 kn por ĉiu membro.

Entute por Universala kaj Eŭropa Asocioj 8,46 kn. Ni rondigis la sumon al 8,50 kn por ĉiu aligita membro. El la kotizo por ĉiu membro restus por KEL 7,50 kn por ĉiu aligita membro.

Sume: 16 kn por ĉiu anoncita membro de asocio al Kroata Esperanto-Ligo.

J. R. H.



Fotis
Damir Makloč

Hlapić en la korea lingvo



En urbo **Pusano** en aprilo 2013, ĝuste por honori la naskiĝtagon de **Ivana Brlić-Mažuranić** la 18an de aprilo, aperis Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić. La korean tradukon el la esperantlingva traduko prizorgis **Ombro Jang**, nia kunlaboranto kun kiu ni jam kunlaboris en 2012 per la eldono de la korea traduko de **Tibor Sekelj** Kumauaua – filo de la ĝangalo. La plena nomo de la tradukisto estas **JANG Jeong-Ryeol**. La desegnistino de la korea Hlapić estas **LEE Da-jeong**. La unuan publikan prezenton de la korea libro faris oficistino de la Ambassadejo de Koreio en Zagrebo **Wi Son-ok**.

Ni dankas la eldonon al la tradukisto Ombro, kiu trovis la eldonejon **Sanzini** en sia urbo **Pusano**. La korea libro estos prezentota dum la Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko.

S. Štimec

“Hlapić” por blindaj esperantistoj

Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj – KUNE decidis okaze de la centa jubileo de *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić* eldoni la sonan version de la esperantlingva *Hlapić* sur kompaktdisko, en traduko de **Maja Tišljar**.

Oni planas eldoni kompaktdiskon per la helpo de **Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj**. Voĉlegas **Spomenka Štimec**. KUNE ŝatus havi la esperantlingvan *Hlapić* ĝis la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en **Bulgario** en somero 2013.

A.K.



“Hlapić” por du miliardoj da homoj

Per la korea eldono de *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić*, Kroata Esperanto-Ligo faris ion vere atentindan en la kroata kulturo: tradukita per Esperanto en ses lingvoj Hlapić nun povas atingi du miliardojn da homoj! Mi kredas ke tio kio oni efektivigis per Ivana Brlić-Mažuranić okazis nek al Andrić nek al Krleža. Tio okazis dank al Esperanto.

En la jaro kiam ni festas centan jaron ekde la unua apero de Hlapić, ni esperantistoj devus tion aparte akcenti kaj diskonigi.

Zlatko Tišljar

Marin Mikulić,
zagrebano, parolanto de la ĉina lingvo,
plurfoje kunlaboris kun Kroata Esperanto-Ligo en 2013,
prezentinte fragmenton el la ĉina traduko de „Hlapić”.
Fotis Spomenka Štimec.



TV-elsendo pri Esperanto kaj kuirado



Kaja kaj Carles. Fotis Filip Farszky

Zagreba muzikistino **Kaja Farszky**, kiun la kroataj esperantistoj konas kiel lertan marimbistinon, filmis filmon pri kuirado (kaj Esperanto) en Katalunio. Dum restado ĉe sia esperantista amiko **Carles** en **Katalunio**, aperis la ideo ke Kaja estu proponita kiel partoprenanto de

la elsendo **Karakia** en la TV 3, Televisio de Catalunya, Canal 33. La kunĉambranino de Kaja kaj Carles proponis Kajan al la TV kiel partoprenanto. Komence la propono ke Kaja estu en la programo de Karakia estis ŝerco. Sed la propono plaĉis al la estrino de la programo. Baldaŭ komenciĝis la preparoj kun la ĵurnalistoj **Luis Hidalgo Carrillo** kaj **Josep Mulet Ferriol**. La filmado okazis en la urbo **Mataró**. La elsendo donis la okazon prezenti Kajan kaj Carles kiel muzikistoj kaj esperantistoj. La tuta elsendo portas la nomon *La universalaj lingvoj*. Kaja kuiris kroate kaj ne maltrafis reklami la kroatan spicon *Vegeta*.

La filmo estis elsendita la 19an de majo en daŭro de 18 minutoj.

Videbla per <http://www.tv3.cat/karakia/capitols/207/La-universalaj-lingvoj---Els-llenguatges-universals>.

En la TV-programo la publiko povas ekscii ke esperantistoj parolas multajn lingvojn. Oni aŭdas interalie kiel Kaja parolas la katalunan.

La elsendo estas ne nur programo pri internacia kuirado sed ankaŭ reklamo pri internacia amikeco.

Estus ĉarme se ankaŭ la kroata publiko povus sperti tiun TV-programon.

K. Farszky / S. Štimec

Agado de Esperanto-Klubo "T. Sekelj"

Esperanto-Societo Tibor Sekelj estis fondita la 21an de septembro 2012. Regulaj monataj programoj okazas unufoje monate, plej ofte la unuan merkredon de la monato.

Jen la listo de ĝisnunaj prelegoj:

- 3.10.2012 - **Zlatko Tišljar**: Tibor Sekelj
- 7.11.2012 - **Spomenka Štimec**: Honore al Joža Horvat
- 5.12.2012 - **Neven Kovačić**: Historio de eŭropaj integriĝoj
- 9.1.2013 - **Neven Kovačić**: Belgio (Enkonduke muzikis per violono Namjoo Oh el Koreio)
- 6.2.2013 - **Zlatko Tišljar**: Kia estus Eŭropo nun se ne ekzistus EU? (prezento de la projekto)
- 6.3.2013 - **Davor Klobučar**: Kiel aperis Esperanto en Kroatio - Pilepić, Špicer kaj Bedeković
- 3.4.2013 - **Spomenka Štimec**: Vodnikova 9, dek jarojn kun ni. (Enkonduke muzikis per saksafono Denis Tišljar)
- 8.5.2013 - **Zlatko Tišljar**: Lingvaj problemoj en Eŭropa Unio
- 5.6.2013 - **Mea Bombardelli**: Pinkonusoj, kaj ĉu 64 = 65?

Esperanto-Societo Tibor Sekelj havis interalie la unikan okazon premiere spekti la malkovrojn de **Davor Klobučar**, kiu prezentis la fotojn de ĝis nun nekonataj tomboj de gravaj kroataj pioniroj de Esperanto **Danica Bedeković Pobjenička** kaj **Mavro Špicer**, malkovritaj en la zagreba tombejo Mirogoj kaj kiujn ni la unuan fojon publikigas. Estas interese scii ke la tombo de Mavro Špicer najbaras al la tombo de granda kroata poeto Dobriša Cesarić.

Por la septembro estas planataj la ekskursoj:

- al Hraščina la 14an de septembro por renkonti verkistojn kaj tradukistojn, (el Irano, Rumanio, Serbio kaj Italio) kaj ĝui muzikan programon de **Kaja Farszky**. Atendas vin senpaga tagmanĝo kun verkistoj kun specialaĵoj de **Jadranka Farszky - Pavica**.
- al Jankovac sur Papuk por la 24a Montkabana Renkontiĝo prizorgata de **Vanja Radovanović** kaj **Višnja Branković** de la 26a ĝis la 29a de septembro!

Mea Bombardelli



Davor Klobučar trovis en la zagreba tombejo Mirogoj kaj fotis du tombojn de personoj kiuj gravegas en la kroata Esperanto-historio kaj kiuj ĝis nun ne estis konataj: la tombo de Danica Bedeković Pobjenička kaj de Mavro Špicer.



Ni instruas

En **Kroata Fervojista Esperanto-Asocio** finiĝis en junio per distribuo de diplomoj la porkomencanta Esperanto-kurso gvidita de **Roža Brletić-Višnjić**.

Ivan Špoljarec finis en junio la porkomencantan kurson en **Urba biblioteko Travno** en Zagrebo.

Mate Špekuljak komencis la 20an de junio gvidi someran kurson por membroj de la **Asocio por la rusa lingvo kaj kulturo**. Dum la kurso estas uzata la ruslingva lernolibro de Esperanto laŭ la Zagreba Metodo. La kurso okazas en Amruševa 13, en la sidejo de la asocio.

Judita Rey Hudeček lekciis enkondukan lecionon pri Esperanto al kvin instruistinoj de Esperanto-lernejo **Mladost** la 26an de junio 2013 en la lernejo Mladost en Zagrebo.

RBV; IŠ, MŠ; JRH

Zagrebaĵ esperantistoj kaj Makedonio

Judita Rey Hudeček prelegis la 13an de junio 2013 pri kroataj-makedonaj rilatoj en **Klubo de verkistoj**. En tiu bone kanata kroata literatuta ejo, ŝi aparte akcentis la traduklaboron de esperantistoj el la makedona lingvo. La publiko miris ke tiom multaj esperantistoj okupiĝis pri la makedona kulturo: akademiano Dalibor Brozović, Josip Velebit, Nikola Rašić, Dinka kaj Slavko Šimunić, Judita Rey Hudeček. La organizantoj de la programo estis Kunordigo de konsilioj de naciaj manirotoj, Filozofia fakultato kaj Klubo de verkistoj.

J.R.H.

Paŝoj por kandidatigo de Zagreb por UK

Ekde junio 2013 Zagrebo havas novan urbestron **Milan Bandić**. Li estas la sama urbestro kiu kunlaboris kun Kroata Esperanto-Ligo en 2001 kaj transprenis dum la tiama Universala Kongreso de Esperanto la skulptaĵon **La Futuro** de dana skulptisto **Jesper Neergaard** sur la zagreba placo Kennedy. Prezidantino de Kroata Esperanto-Ligo **Judita Rey Hudeček** sendis leteron al la urbestro kun la informo ke Kroata Esperanto-Ligo konsideras denove gastigi Universalan Kongreson de Esperanto. El la urbestra oficejo oni informis nin ke ni traktu la temon unue en Urba oficejo pri klerigo, kulturo kaj ŝporto, kie la prezidantinon akceptos la 8an de julio 2013 **Božica Simleša**.

S.Š.

Davor Grgat honorigita

Dankdiplomo de la komunumo **Podstrana** estas atribuita al esperantisto el Split, **Davor Grgat**, pro lia kontribuo pri informado pri la komunumo. Grgat ricevis la dankdiplomon la 20an de junio 2013. Li naskiĝis en **Krilo Jesenice** en 1935. Li estas kronikisto de la regiono **Poljica**. Dank' al lia multjara ĵurnalisma agado multaj artikoloj pri Esperanto estis publikigitaj. Informoj pri li troviĝas en Leksikono pri historio de ĵurnalismo kaj publiĉismo. Laste li informis la 10an de junio 2013 en Slobodna Dalmacija pri la Jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo.

Korektoj en Tempo 117

Josip Pleadin atentigas ke la foto sur la p. 4 en Tempo 117 venas de **Jozo Lovrić** kaj ne de **Siniša Milašinović**. Li kompletigas la informojn pri instruado sur la p.4 Esperanto-Kurso en **Sisak** okazis en la kulturcentro *Kristalna kocka vedrine* kaj la ekzameno en Copy Print Salono. *J. Pleadin*

El la triaĝa perspektivo

La unua kaj la dua aĝ' de l' vivo
rigardata el la perspektivo
de la tria, aŭ eĉ post la tria,
ŝajnas aparteni al la mondo alia.

Ĉu estas ĝi vero, aŭ nur reliefo
de l' iama sonĝ, somnolita revo,
aŭ ies alia surterad' ĝi estis,
kiu tiun paseon vivi sugestis?

Ĉiam pli rapide ŝanĝiĝas la mondo,
Aperas novaĵoj, malaperas moroj.
Nin surverŝas novaj ŝokfrapantaj ondoj.

La generacioj plue dislontanas.
Restas nur memore bildoj kaj odoroj,
Ia nostalgio. Ni ja veteranas.

Lucija Borčić

Forgesita Esperanto-historio el Osijek

(2-a parto)

Josip Hartl (Osijek 1888 – Osijek 1968) estis ĵurnalisto kaj publicisto el Osijek. Interesa estis lia agado por instigo de kroata nacia sento ĉe kroataj grupoj en Vojvodina (Serbio). Sed pleje gravis, ke li estis direktoro de la presejo „Građanska tiskara“ en Osijek (1922-1935) kaj eldonisto kaj redaktoro de la gazeto „Hrvatski list“ (1925-1935). Li estis membro de la LKK de la 8-a jugoslavia kongreso de esperantistoj en Osijek 1935. Verŝajne al li ni povas danki, ke Hrvatski list publikigis dekojn da artikoloj pri Esperanto!



La klubo „Prospero“ el 1934. Pri tiu klubo neniu vivanta esperantisto en Kroatio sciis, kiam mi en 2009 en la ŝtata arkivo en Zagreb (Hrvatski državni arhiv) trovis kelkajn dokumentojn rilatajn al tiu klubo. Mi legis la protokolon de la fondkunveno okazinta en la bierfabriko de C. Šeper en Osijek (25 apr 1934), kiun ĉeestis 32 esperantistoj. Prezidanto de la fondkunveno Dragutin Wranka argumentis pri neceso de fondiĝo de la nova klubo. Li akcentis la fakton, ke 85% da membraro de „Obstine Antaŭen“ vivas en la parto de Osijek nomata Donji grad („malsupra urbo“), kiu estas sufiĉe malproksima de la alia parto Gornji grad („supra urbo“), kaj tial esperantistoj el ambaŭ partoj ofte ne povas komune kunsidi. Li eĉ proponas fondi plian novan societeton por Gornji grad, el kio mi komprenas, ke li toleras eĉ 3 societojn en Osijek?!

Poste Wranka kaj Viktor Magdić parolis pri la ĝenerala signifo de Esperanto. Sed unu frazo malkovras plian nuancon de la afero! Ĝi diras: „Protokole oni konstatis, ke ĉiuj ĉeestantoj antaŭ nelonge estis membroj de la esperanta societo ‘Obstine Antaŭen’ en Osijek, kaj ili forlasis tiun klubon, ĉar ili ne povis konsenti kun la labormetodoj de la estraro de la klubo ‘Obstine Antaŭen’.“ Originale:

„Zapisnički se konstatira, da su svi prisutni, do nedavna bili članovi esperantskog kluba „Obstine antaŭen“ u Osijeku, a istupili su iz kluba, jer se nisu mogli složiti sa metodama rada uprave kluba „Obstine Antaŭen“.“

El ĉiuj menciitaj nomoj la sole gravaj ŝajnas esti tiuj de Dragutin Wranka, Viktor Magdić kaj la industriisto Matija Gotta. Supozeble la tutan aferon „kuiris“ Wranka.

Kun bedaŭro mi devas rimarki, ke esperantistoj ofte estis tre malkonkordaj. Eĉ se temas pri nur grupeto da opoziciuloj, ankaŭ tiam ĉiu kverelo tre malfortigas nin, ĉar ni eĉ sen tio estas malmultenombraj!

Tamen, la afero finiĝis bone. Post nur 4 monatoj la societo sin malfondis mem kaj la membroj revenis al „Obstine Antaŭen“. Mi legis ankaŭ la protokolon de la malfonda kunveno (Zapisnik likvidacione skupštine Esperantskog društva „La Prospero“). Ne estas menciita la kialo de tiu ĉi „mal-secesio“.

Sed tre bone estas, ke la afero finiĝis, ĉar la sekvan jaron (1935) en Osijek okazis tre sukcesa 8-a jugoslavia esperanta kongreso.

Mistera malkonkordo, nova divido kaj „Verda Stelo“. Tamen, unu jaron post tiu kongreso (majo 1936) raportas „La Suda Stelo“ pri novaj malbelaj eventoj inter osijekaj esperantistoj, kiuj rezultis per krizo en „Obstine Antaŭen“. Kaj la krizo havis kiel rezulton (ne kiel kaŭzon!) fondon de la paralela esperanta klubo „Verda Stelo“ en Osijek.

„...Osijek, la gastema urbo de nia „oka“, kiu kun sia grandnombra samideanaro kaj imponaj kongresarangoj, kore bonvenigis kaj agrable surprizis la tutlandan esperantistaron, kvazaŭ malaperis de sur jugoslavia esp. landkarto (...) Tuj post

la kongresaj tagoj en la urbo multe estis parolata pri Esperanto. La kongreso vekis ĉe la loĝantaro konsiderindan intereson al Esperanto. Anstataŭ tion sukcese eluzi, certaj samideanoj malebligis la pluan konkordan kaj unuecan laboron en nia organizo. Ekestis diversaj cirkonstancoj kiuj devigis multajn samideanojn subite aŭ post certa tempo ekŝigi. (La detalajn kaŭzojn ne estas oportune tie ĉi pritrakti.) Estas do kompreneble ke sub tiaj cirkonstancoj ĉiu sukcesa laboro maleblas. Pli ol 50 samideanoj staras jam dum monatoj neorganizitaj. (...) Konsciaj ke nur organizita kaj aktive laboranta esperantisto utilas al Esperanto, kaj ne dezirante ke la ekŝigitaj samideanoj, inter kiuj troviĝas konservindaj kaj fervoraj samideanoj, tute perdiĝu, ni decidis fondi novan organizon [duan] en Osijek, en kiu kolektiĝos ĉiu serioze laborema samideano nuntempe neorganizita. Tion ni konsideras nia esperantista devo (...) Baldaŭ ni donos ree vivsignojn pri ni.“ Kaj la subskribo estis nur: „Samideanoj“.

Bedaŭrinde, LSS ne skribis pri la kaŭzoj de tiu malkonkordo (ĉar ilin „ne estas oportune ĉi tie pritrakti“), kaj nun jam neniu en Osijek scias pri tio. Kaj ankaŭ ekster Osijek neniu scias ion ajn. Oni povas nur supozi, ke certan rolon povis havi la faktoj, ke Kraus estis granda komunisto kaj Wranka (ŝtata oficisto) verŝajne dekstrulo. Kaj mi povas konsili al hodiaŭaj kaj estontaj esperantistoj la jenon: ne silentu, skribu pri ĉio, por ke oni nenion forgesu! Alikaze la samaj eraroj ripetigis ĉiam denove! Kaj tial, kvankam estas same „maloportune ĉion ĉi pritrakti“, mi devas menciĝi ŝajne fervoran poresperantan, sed fakte kaŝitan fian agadon de Pleadin, Milošević kaj Radulović. Mi volonte prenos sur min ilian neeviteblan furiozon, ĉar tiun ĉi tekston certe iam legos iu futura esploranto!

Tiel okazis fondkunveno de „Verda Stelo“ (17 maj 1936) kaj la konstituiga kunveno okazis, komence de julio 1936, laŭ certa artikolo en „Hrvatski list“ (13 jul 1936). La prezidanto fariĝis Ladislav Firicky, la sekretario Franjo Inselt ktp. En la kontrolo komitato estis ankaŭ d-ro Lavoslav Kraus, posta partizano kaj en socialisma Jugoslavio prezidanto de la tutlanda esperantistaro!


Tamen la agado de la du kluboj post 1936 estis verŝajne malalta ĉar en „Hrvatski list“ kaj en „La Suda Stelo“ mi povis trovi tre malmulte. Eĉ la trovitaj novaĵoj estis malgravaj, malmultaj kaj ĉefe el „Verda Stelo“. Ĉu temis pri malfavoro de la ŝtato (la registaro de Stojadinović!)? Ĉu pri policaj intervenoj, ĉu pri timo pro proksimiĝanta mondmilito? Eble, sed oni ne scias. Ĉiukaze, al mi ŝajnas, ke Firicky estis pozitiva persono, kiu meze de la tuta katastrofo provis nur savi esperantismon en Osijek.

Mi devas rimarki, ke Laborista Esperanto Societo en Osijek fondiĝis en 1933 kiel filio de la samnoma organizo ekzistanta jam en la landa nivelo, sed en 1938 la ŝtato ĝin malpremis. Ĉiuj protestoj estis rifuzitaj kaj la provo refondi ĝin en 1940 estis rifuzita fare de la ŝtato, samkiel la provo fondi ĝin sub alia nomo „Zamenhof“ en 1938. La ŝtato suspektis esperantistojn pro komunista influo, cetero ne ĉiam malprave!

Mi trovis en la Kroata Ŝtata Arkivo en Zagreb la dokumenton, en kiu la osijeka urba polico raportas 13 apr 1938 pri polica traserĉo en la ejoj de la societoj „Verda Stelo“ kaj „Obstine Antaŭen“ kaj en la redaktejo de la laborista gazeto „Antaŭen“, sed ke nenio suspektinda troviĝis. Almenaŭ mi trovis konfirmon, ke 1 adu societoj eĉ tiam ekzistis.

(De la sama ŝtata arkivo mi ricevis la raporton, ke la polico serĉis iun komuniston esperantiston Stjepan Ĉaklec, kaj lian esperantan korespondaĵon la polico ne povis kompreni. Tial ĝi donis la korespondaĵon al Danica Bedeković, kiu ĝin tradukis!)

Lavoslav Kraus. En la osijeka ŝtata arkivo mi trovis lian dosieron, kaj, kvankam ankoraŭ ne ĉio estis publike akirebla, oni



kopiis por mi plurajn fotojn de osijekaj esperantaj kunvenoj kaj aŭtobiografion de Kraus ktp. Jen kion Kraus (cetera kuracisto, judo kaj granda komunisto, kaj estro de jugoslaviaj esperantistoj post 1945) skribis pri „Laborista Esperanto Societo“ en Osijek kaj pri ties gvidanto Vjekoslav Premuž:

„Iste 1935. godine osnovano je u Osijeku, iako su već prije toga bili radnički kursevi gde se učio esperanto i koje sam u velikoj većini ja vodio, posebno radničko esperantsko društvo. Tu je rukovodio Vjekoslav Premuž koji je bio sudionik mađarske komune. Kako se vratio posle komune u Jugoslaviju, bio je stalno doduše u kontaktu s radničkim pokretom, ali se od svake revolucionarnosti distancirao. Izživljavao se kroz taj esperanto, da li je zaista mislio da je to pravi put, po kome se dolazi do revolucionarnih rezultata?...“

Ladislav Firicki. Li naskiĝis en 1899 en Dombovar en Hungario, kiel unu el 6 infanoj. Lia avo devenis el Pollando. Ladislav finis la realan gimnazion en Osijek kaj laboris kiel librotenisto en la biskvit-fabriko “Karolina” en Osijek. Dufoje li edziĝis, sed lia sola infano, la filino Miroslava, mortis en Osijek sen edzo kaj sen idoj. El la tuta parencaro mi povis trovi nur la nevon Zdenko Firiczky en Osijek, kiu donis al mi ĉiujn ĉi informojn. La foton la familio ne havis, restis nur la (iom malbona) foto el “La Suda Stelo”, montranta la LKK-on de la jugoslavia kongreso en Osijek 1935, kies membro li estis.

Ladislav Firicki (Firiczky) pereis en septembro 1942 kiel kroata soldato “domobrano” batalante kontraŭ ribelantaj serboj (helpataj fare de “volontuloj” el Serbio, kiun sendis la serba registaro ,kvankam Serbio tiam estis okupata fare de Germanio!). La batalo okazis ĉe Višegrad.

Tiel, do, la milito senigis la urbon Osijek je unu grava esperantisto kaj movada gvidanto. Kaj ni ne forgesu, ke ankaŭ la grava osijekaj gvidanto Dragutin Wranka devis en 1945 elmigri al Argentino.

Nekonataj detaloj el kroata Esperanto-historio

Tombo de Mavro Špicer. Velimir Piškorec en sia verko “Iz života i djela Mavra Špicera (1862-1936)” skribis, ke tiu gravega kroata esperantisto kaj fondinto de la kroata esperanta movado estis entombigita en sia naskiĝurbo Našice, en la juda tombejo. Krome li skribis, ke la tombejo estas en tiom malbona stato, ke la tombon de Špicer oni ne povas trovi.

Sed mi faris simplan interretan traserĉon de la tombejo Mirogoj en Zagreb, kaj malkovris, ke Mavro Špicer estas entombigita tie, en la kampo 45, klaso 1, tombo 131. Mi malkovris ankaŭ, ke li havis 2 filinojn. La unua, Anica, dronis en Sava en 1921, estante ankoraŭ fraŭlino. La dua, Zora Sajvert, edziĝis kaj divorcis, ne havis idojn kaj mortis en 1972 en la domo en Palmotićevo 37 en Zagreb. Mi trovis la familion kiu zorgis pri ŝi, Ili rakontis, ke ili devis titoli Zora-n per „Milostiva“. Kaj, pli grave, ili asertis, ke nenio el la aĵoj konserviĝis. Laŭdire aperis amaso da “parencoj” kiuj forprenis ĉion. Eble esperantistoj?! Mi skribas tion ĉi, por ke vi vidu, kiel post morto de unu homo facile malaperas ĉiuj objektoj rilataj al li/ŝi.

Ĉiukaze, zagrebaj esperantistoj povus pli bone informiĝi pri la meritoj de Mavro Špicer kaj foje ankaŭ meti florkronon sur lian tombon. La menciita artikolo de Piškorec estas en la TTT-paĝoj de KEL.

Danica Bedeković - la vivo kaj aro da fotoj. Ŝi estis la dua plej grava esperanta pioniro en Kroatio, aperinta nur kelkajn monatojn post Mavro Špicer. Krom la fakto, ke Špicer estis la unua, ŝajnas ke en ĉiuj aliaj agoj ŝi estis same aŭ eble eĉ pli grava! Pri ŝi oni sciis multon, sed neniu iam ajn provis kontakti ŝiajn eventualajn posteulojn.

En 2008, kiam oni en Zagreb festis 100-jariĝon de la zagreba kaj samtempe kroata esperanta movado, dank’ al Velimir Piškorec ni kontaktis nepon de Danica Bedeković. Sed neniu poste interesiĝis aŭ ne sukcesis retrovi lin. Mi en 2010 estis pli energia, kaj organizis renkontiĝon kun tiu nepo Silvio Pallua kaj kun lia kuzino Ljerka Hadžihalilović (nepino de Danica).

Mi aŭdis multajn detalajn informojn pri Danica Bedeković kaj, dank’ al mia fotilo, surloke mi faris multajn sufiĉe bonajn fotojn de diversaj dokumentoj kaj de fotoj el familiaj albumoj. La fotojn mi dissendis al pluraj kroataj esperantistoj kaj societoj, pri kiuj mi esperis, ke ili konservos ilin: Kroata Esperanto-Ligo, Esperanto societo Rijeka, Dokumenta Esperanto-Centro ktp. Kaj, kompreneble, en mia komputilo kaj en mia rezerva ekstera disko mi zorgos pri la fotoj ĝis mia vivofino.

Danica havis 3 infanojn: Vladimir (1903), Danko/Daniel (1907) kaj Dragica (1904 aŭ 1905). Vladimir ne havis proprajn idojn, Dragica havis la filon Silvio Pallua, kaj Danko la filinon Ljerka (Lela) Hadžihalilović. La edzo de Danica, Vladimir Bedeković Pobjenički, pereis en la unua mondmilito en Rusio, sed oni scias nek kiel, nek kie. Danica restis vidvino kun 3 etaj infanoj. Eble pro tio ŝi post 1921 ne plu estis aktiva en esperanta movado? Sed tiom pli ŝi estis aktiva en la jugoslavia virina movado. En 1953 ŝi estis honore invitita kiel gasto al la Universala Kongreso en Zagreb. Ŝi venis. Sed mi aŭdis la onidiron, ke ŝi jam pro sia aĝo kaj longa esperanta paŭzo nur tre malbone kapablus uzi Esperanton. Bedaŭrinde mi forgesis la informinton.

Mi trovis jam en „Kroata Esperantisto“ (1909-1911) ŝian poemon dediĉitan al Zamenhof „Al nia karega Majstro“, kun interesa lasta strofo:

„Akceptu favore Vi la tri kolorajn / Floretojn, ho Majstro amata / La ruĝan, la blankan, la bluan, - donacon / De mia nacio kroata!“

Kaj la familio memoras la anekdoton, ke ŝi, tuj antaŭ la morto en 1955, demandis la pastron: “Ĉu estas peko, ke mi estis jugoslavino?” Almenaŭ la pastro tion raportis.

El la dokumentoj mi havas ŝian baptoatestilon, geedziĝan atestilon, funebran anoncon, diplomon de societo de katolikaj virinoj, poŝtkartojn kaj fotojn de iuj esperantistoj. Kaj fakte la solaj bonaj fotoj de Danica rezultis el la esploro mia.

Interesa estas la ekzemplero de la fama esperanta lernolibro de Dušan Maruzzi, kiun la aŭtoro donacis al Danica kun la sekva esperanta komento: „Al kara samideanino Danica pl. Bedeković por memoro de ĉiam fidela D. Maruzzi, Zagreb, 6.1.22.“

La sola kvalita foto de Dušan Maruzzi. Lia nepo, same nomata Dušan Maruzzi, vivas hodiaŭ en Slovenio. Pleadin provis kontakti lin, sed ne estis respondo. Tamen, kiam Pleadin informis pri tio min, mi faris la aferon pli energie kaj sukcesis ricevi (per Facebook-programo!) unu bonan foton de Maruzzi el liaj relative junaj tagoj. Krom tio, mi ricevis el la Kroata Ŝtata Arkivo el Zagreb multajn dokumentojn rilatajn al la kariero de Maruzzi (kaj malrekte ankaŭ al lia ĝenerala biografio).



Ivan Stalzer. Tiu ĉi sinjoro altiris mian atenton ĉar lia nomo aperadis en diversaj epokoj kaj en diversaj urboj. Li estis en 1907 en Rijeka en la fama listo de kunfondintoj de la unua esperanta klubo en Kroatio (Adriatika Ligo Esperantista). Nu, tio ne estas stranga, ĉar mi malkovris, ke li naskiĝis ĝuste en Rijeka. Due, li menciigas ĉ. 1909 en Zagreb kiel delegito de UEA. Ankaŭ tio estas komprenebla, ĉar li en Zagreb studis juron. Kaj en 1923 li estis en Osijek dum fondiĝo de la unua klubo tie! Sed poste lia familio klarigis, ke lia edzino estis el Osijek. Ili decidis aŭ eĉ devis forlasi Rijeka-n, kiun tiutempe prenis Italio. Li konatiĝis kun la edzino en Osijek, dum la unua mondmilito, kiam li certan tempon devis pasigi tie. De lia nepino el Rijeka mi ricevis unu foton en lia matura aĝo kaj interesajn rakontojn pri lia familio. Kiam en 1945 jugoslaviaj komunistaj partizanoj eniris en Zagreb, li post nur kelkaj tagoj estis arestita kaj forkondukita. Neniam plu oni aŭdis pri li.

Rijeka – Sušak 1922. En la arkivo de Zagreba Esperanto Societo (originalo ĉe DEC, kaj kopioj ĉe mi kaj en TTT) mi trovis leteron de esperantistoj el Sušak senditan al esperantistoj zagrebaj por raporti pri la esperanta agado kaj stato en Sušak.

„*Respektinda esperanta societo,*

La subskribita havas honoron sciigi vin, ke 20an de Aŭgusto fondiĝis esperanta societo kaj ĝi nun nombras 87 membrojn. De ĉi tiuj vizitadis responde vizitas esperantajn kursojn 68 membroj. Intereso pri Esperanto estaas sufiĉa. Direkcio de societo konsistiĝas el: prezidanto sro. Josip Lipić, subprezidanto sro. Viktor Muha, sekretario sro. Rudolf Goldner, subsekretariino fino. Maria Perković, kasisto asro. Marian Levar, anstataŭantino fino. Maria Ružić. Komitato: Finoj. Maria Ĉekada, Danica Ĉekada kaj Josipa Ĉekada. Kun samideana saluto

Societo Esperantista Sušak 26 IX 1922, (subskribis la sekretario kaj la prezidanto)“

Zagreba Esperanto Societo. Inter pluraj dokumentoj kiujn havas mi (kaj DEC), mi elektas la protokolon de la jarkunveno de 20 jan 1923, kiun prezidis Dušan Maruzzi. En la punkto 5-a mi legis jenon:

„*Predsjednik pita dali ima tko od skupštinaru što primjetiti na dane izvještaje; javlja se član Perćec Gustav te govori protiv društvenog rada navedenog u tajničkom izvještaju, protivni se osnivanju „Jug. Esp. Saveza“ kao i organizaciji I. Jug. E. Kong., upozoruje da se tako dalje ne radi već da se sazove Kongres hrv. esp. a u protivnom slučaju da će protiv kongresa (I. jug. Esp. K.) kao i samog esperanta upotrebiti sva moguća sretstva. Nakon tih riječi ostavlja dvoranu.“*

Ĉiu simileco inter tio kaj la jarkunveno de KEL en 2011 estas hazarda.

Davor Klobučar



Esperanto en Filozofia fakultato en Zagrebo

La studjaro 2012/13 alproksimiĝis al sia fino. En Filozofia fakultato la 12an de junio 24 studentoj de la seminario **Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto**, gvidita de profesoro **D-ro Velimir Piškorec** skribis ekzamenon. La skriba ekzmeno konsistis ĉefe el gramatikaj demandoj, la teoriajn demandojn la studentoj solvadis dum buŝaj prezentiĝoj. Estas agrable scii ke 24 studentoj de la zagreba universitato konas strukturon de Esperanto.

Laŭ V. P. /S.Š.

Kroataj fervojistoj en IFEF-kongreso en Francio

La 65a IFEF-kongreso okazis en **Artigues près Bordeaux** en **Francio** de la 4a ĝis la 10a e majo 2013. **Marica Brletić** kaj **Zlatko Hinšt** partoprenis el **Kroatio**. Al la kongreso **Zlatko Hinšt** kontribuis per la prifervoja prelego. **Marica Brletić** prelegis ankaŭ en **Esperanto-Klubo Limusin** pri **Zagrebo** kaj **Kroatio** per videobendo.

M.B.

Esperanto-Konferenco de Alp-Adrio 2013

Izola en **Slovenio** gastigis tridekon da esperantistoj kadre de la 17a **Esperanto-Konferenco de Alp-Adrio**, de la 1a ĝis la 2a de junio 2013, organizita de **Fani Rižnar** kaj **Edvige Ackermann**. Partoprenis el **Kroatio** esperantistoj el **Rijeka** **Vjekoslav Morankić**, **Boris Di Costanzo** kaj **Marisa Dabo**. Kun la italaj esperantistoj oni interkonsentis komunan programon en **Triesto 2013** okaze de Zamenhof-tago, kiam esperantistoj el **Rijeka** tie prezentos libron **Pirgo** de **Andelka Martić**.

V. M.

Kunlaboro kun esploristoj de infanliteraturo

Kroata asocio de esploristoj de la **infanliteraturo/ Hrvatska udruga istraživača dječje književnosti** multe aktivas en 2013 okaze de la centjariĝo de la libro **Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić**. La reprezentanto de la asocio vizitis nian oficejon por informi pri la atingoj de **Kroata Esperanto-Ligo** pri **Hlapić** en **Azio** kaj la ĉefredaktorino de la asocia revuo **Smiljana Narančić Kovač** mendis artikolon pri la temo por la revuo **Libri kaj Liberi**. (En la redakcio membras esperantisto el **Varaždin** **Tihomir Engler**.) La asocio proponis ke ankaŭ niaj eventoj pri **Hlapić** okazu sub la ilia Hlapić-simbolo.

S.Š.

Prof. D-ro Josip Vrančić
(1923 -2013)

La 26an de marto 2013 mortis arthistoriisto Prof. D-ro **Josip Vrančić**. Li estis granda fakulo pri la kroata pentristo **Milivoj Uzelac** (1897-1977) kaj verkinto de la monografio pri la pentristo. Li doktoriĝis pri la verkarto de **Milivoj Uzelac**. Teorio de la arto estis en la fokuso de lia profesia interesiĝo. Profesie li direktoris la Artgalerion en **Dubrovnik** kaj de 1964 ĝis la pensiigo, lekciis en la Universitato de **Zadar**, en la fako pri la arthistorio.

Esperanto estis lia granda pasio. Li lasis al Kroata Esperanto-Ligo sian lastan tradukon, kroatigon de la verko de **Edmond Privat L.L. Zamenhof - Aŭtoro de Esperanto**.

S.Š.



*Prof. D-ro Josip Vrančić
(E-simpozio, Zagrebo, 1986).
Fotis Ivan Špoljarec*

662. Višnja Branković	6,64 eŭroj
663. Emilija Obradović	10,00 eŭroj
664. Anto Mlinar	42,44 eŭroj
665. Dinka Šimunić	9,29 eŭroj
666. Anonima	132,63 eŭroj
667. Vjekoslav Morankić	21,22 eŭroj
668. Bojana Đuričić	10,61 eŭroj
669. Lucija Borčić	26,54 eŭroj
670. Spomenka Štimec	6,54 eŭroj
671. Zdenka Hajnić	2,66 eŭroj

Inter januaro kaj majo 2013 KEL kolektis inter siaj membroj 268,57 eŭrojn.

Ekde la jaro 2003 KEL kolektis inter siaj membroj 27.943,95 eŭrojn.

Nia granda kredito de 50.500 eŭroj reduktiĝis al 8.492,49 eŭrojn.

Aliaj kaj la lastaj kreditoj:

Kredito al E-Societo „Trixini“ 16.669,90 eŭroj.

Kredito al Esperanto-Societo Rijeka: 2.464,15 eŭroj.

Memorigo:

Kiam ni aĉetis nian ejon en Vodnikova en 2003, ni pagis por ĝi 108.000 eŭrojn. Ni devis pagi aldone imposton de 5.000 eŭroj. Sume ni pagis 113.000 eŭrojn.

Ĉu ni translokiĝos al Vodnikova 9 en 2014? Nun ni ankoraŭ povas uzi la ejon en Knez Mislav 11. Kiom longe? KEL povus uzi parton de niaj ejoj en Vodnikova dum la alia parto de Vodnikova estu loĝata, por ke ni povu pagi krediton.

Niaj societoj invitas

Kruno Puškar, profesoro pri la angla kaj germana lingvoj en **Križevci**, daŭrigas kunlaboron kun la **Biblioteko Franjo Marković el Križevci**. Li gvidos en la biblioteko por la interesiĝintaj samurbanoj 5-tagan laborejon **Esperanto kaj lingva egalrajteco**. La partopreno estas senpaga. La tutan projekton financas **Nacia fondaĵo por evoluo de la civila societo**. La agado evoluos de la 15a ĝis la 20a de julio 2013, dunivele: por komencantoj kaj por progresintoj. Detaloj haveblas per 0917848630 kaj esperanto.estonteco@gmail.com

Esperanto-Societo Sisak, kunlabore kun **Esperanto-Societo „Viktor Mihovilić“ el Karlovac**, **Esperanto-Societo „Mondo Paca“ el Velika Gorica** kaj **Esperanto-Societo Petrinja** invitas al **Esperanto-Boatado sur la rivero Kupa**, de la 31a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2013. Bonvolu peti detalojn per boatado.kask@gmail.com, poŝtelefono --99 243 3352.

Dokumenta Esperanto-Centro invitas al **Adriatika Feriado**, feria kaj turisma aranĝo kun Esperantaj programoj en **Prvić Luka** de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 2013. Detaloj pri la aranĝo haveblas de la organizanto dec.kroatio@gmail.com, --98 248 576.

Renkontiĝo de verkistoj kaj tradukistoj, organizita en **Hrašćina** de la 13a ĝis la 15a de septembro de **Kroata Esperanto-Ligo**. La ĉefa gasto estos **Acktar Etemadi el Teherano**, tradukistino de la libro **Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić** persan, kun kiu ni celebros 100 jarojn ekde la apero de la infanlibro. En la programo partoprenos rumana verkistino **Julia Sigmond** kaj itala verkisto **Sen Rodin**. La aranĝon financas **Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio** kaj **Akademio Literatura de Esperanto**. Loka kunlaboranto estas **Esperanto-Societo Trixini**. La publiko estas invitata la **14an de septembro 2013 je la 13a horo al piknika tagmanĝo kun verkistoj**. Bonvolu anonci vian alvenon al esperanto@zg.t-com.hr, 091 4617550.

Vanja Radovanović nome de **Kroata Esperanto-Junulara Asocio**, kunlabore kun firmao **Orbispectus** de **Višnja Branković** invitas al **Slavonio, al Montkabano Jankovac** de la 26a ĝis la 29a de septembro. En **Jankovac** sur la monto **Papuk** okazos la **24a Montkabana Renkontiĝo**. Detaloj per www.keja.hr/mkr-n.html.

KONGRESOJ KAJ KONFERENCOJ VIZITINDAJ EN 2013

Kontaktadresoj de Kroata Esperanto-Ligo (KEL): Kneza Mislava 11, HR-10000 ZAGREB,
Tel: ++385(0) 1 4617550, Faksilo: ++385(0)1 461 9373, esperanto@zg.t-com.hr ; www.esperanto.hr

12a – 18a de julio

46a Konferenco de ILEI – en Herzberg, Germanio. Pliaj informoj <http://www.ilei.info>

20a – 27a de julio

98a Universala Kongreso de Esperanto – en Rejkjaviko, Islando

28a de julio – 4a de aŭgusto

86a Kongreso de SAT – en Madrido, Hispanio. Inf: SAT - Sennacieca Asocio Tutmonda; Asociación Izquierda y Esperanto - SATEH Apartado de correos 8537 ES-28080 Madrid, Hispanio. Rete: esperanto@nodo50.org

31a de Julio – 5a de aŭgusto

Kvina boatado sur la rivero Kupa. Inf.: Srećko Radulović. Inf. boatado.kask@gmail.com

3a – 10a de aŭgusto

Adriatika Feriado – Prvić Luka (insulo Prvić) Dalmacio. Inf: dec.kroatio@gmail.com

19a – 26a de aŭgusto

69a IJK, Internacia Junulara Kongreso – en Nazareto, Israelo. Inf.: eli@esperanto.org.il

28a de aŭgusto – 3a de septembro

79a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj – en Obzor, Bulgario. Inf.: Dimo Penev Dimov. JK Mladost bl. 109, vh. 6, ap. 1, BG-9027 Varna, Bulgario. Inf: dimodimov19@gmail.com

13a – 15a de septembro

Renkontiĝo de esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj – Hraščina Trgovišče, bieno de Spomenka Štimec. Inf: esperanto@zg.t-com.hr

21a – 22a de septembro

Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo – en Bjelovar, Inf.: Bjelovara Esperantista Societo, Vlatka Mačeka 14, HR-43000 Bjelovar, Kroatio. Inf: esperanto.bjelovar@gmail.com

26a – 29a de septembro

Montkabana Renkontiĝo – en Jankovac sur monto Papuk. Inf: <http://www.keja.hr/mkr-n.html> .
Inf. vanja.radovanovic@ericsson.com

14a de decembro

Trieste, Italio: Zamenhofa tago. Prezentado de libro **La kapreolido Pirgo** de kroata verkistino Anđelka Martić. Inf: esperanto.rijeka@ri.htnet.hr

En la mondo en 2013 okazos pli ol 200 kongresoj, konferencoj kaj renkontiĝoj, en kiuj la sola laborlingvo estas Esperanto.
Plena kalendaro de Esperanto-aranĝoj en la 2013 videblas ĉe retpaĝo: <http://www.eventoj.hu>

